

Venontaj kunsidoj:

- Lu, la 3-an de februaro
Asembleo
- Lu, la 2-an de marto
Gramatikaĵoj
- Lu, la 6-an de aprilo
Decidota
- Lu, la 4-an de majo
Decidota

Kunsidoj normale okazas ĉiumonate ĉe Espace Dickens, rue Dickens 6, Laŭzano

Lunde, la 6-an de januaro, je la 20-a Knud klarigos al ni pri la « agrolifoj » aŭ *crop circle*



Memoraĵoj pri la filmo

"LA SEKRETA VILAĜETO"

Post la disvastigo kaj la granda sukceso de la filmo "LA MAGIA LANDO", fine de 2018, la membraro de la Laŭzana Esperanto-Societo deziris realigi novan fikcian filmon. Komence de 2019 la scenaro estis verkita kaj tuj la titolo aperis. Ĝus poste la aktoroj elektis sian rolon.

Printempe la reĝisoro kaj mi vizitis kelkajn vilaĝojn valezajn por trovi tiun, kiu povus pli bone esti la plej taŭga dekoro de "la Sekreta Vilaĝeto".

Kelkaj aliaj scenoj estis filmitaj en diversaj lokoj de nia bela lando, dum la monato de septembro 2019.

Sabate, la 7an, la aktoroj

kaj la teknikistoj grimpis - tra malvarma kaj pluvega vetero - al la antikva kaj bela ĉaledo "de la vilaĝestro", apud Villars-sur-Ollon. Dimanĉe ni filmis en la Fervoja Muzeo Blonay-Chamby, riĉa de multe da ĉarmaj kaj malnovaj lokomotivoj.

Unu semajnon poste pli ol 25 partoprenantoj (esperantistoj kaj ne) monten iris al la valo Hérens vivi la kvar tagojn de la Fasta Semajnfino en Evolène, Les Haudères, La Sage kaj Villa ... nia ĉefa filmdekorado. Ĉiuj plezuris personigi la kamparanojn en tiuj belaj vilaĝetoj; la etoso tre agrablis inter la amatoraj aktoroj kaj teknikistoj.

Ĉiuj konservos eksterordinarajn memoraĵojn pri tiuj amikaj momentoj.

Dum la sekvanta semajnfino Genevo estis nia filmstudio, kiel la fluĝaveno, la apartamento de Jacques kaj Florence Sans kaj la kunsida salono de la klubo « la Stelo ». Niaj amikoj de la okcidenta ekstremo de la lago invitis nin vespermanĝi. Plia sperto tre riĉa kaj ĝoja dum tiu ĉi filmado nia.

La partoprenantoj neniam forgesos tiun mirindan kaj belan «Sekretan Vilaĝeton». Dankegon al ĉiuj aktoroj kaj teknikistoj, laŭzananoj kaj ĝenevanoj, jodeluloj el Pully ... kaj speciale al Francisko, pro lia persvada forto kiel reĝisoro kaj filmdirektoro, kiu ĉeestas malantaŭ ĉi tiu amika kaj ega projekto.

Rosario Scopelliti

Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin

ch. de la Vallombreuse 14

CH - 1004 Lausanne

sekretario@eo-l.ch

+41 21 647 29 28

facebook.com/esperantolausanne

youtube.com/esperantolausanne

dailymotion.com/esperantolausanne

poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

Komitato 2019

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)

Vicprezidanto; Knud Sunier (079 210 97 75)

Sekretario; François Randin (076 369 29 17)

Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)

Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

La komitatanoj bondeziras al vi feliĉan novjaron 2020



| | | | | |
|----|---|----|---|---|
| 1 | 2 | 3 | 4 | 5 |
| 6 | | | | |
| 7 | | | 8 | |
| 9 | | 10 | | |
| 11 | | | | |

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. E/Ŝ (estas ___); 6. ___ kodo estas komputila kodo por la baza latina alfabeto; 7. Konsonantoj de rato; 8. Konsonantoj de rozo; 9. Metala kapsirmilo por soldatoj; 11. Malmola organo de la vertebruloj (akuzativo).

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Danĝera fiŝo por naĝanta homo; 2. E/Ŝ (___ ŝerco); 3. Konsonantoj de roko; 4. Loko por spektakloj de akrobatoj kaj klaŭnoj; 5. Verda loko meze en la dezerto (akuzativo); 10. Konsonantoj de ostro.

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| N | O | L | S | O |
| O | K | S | V | K |
| Z | R | | T | R |
| A | I | K | S | A |
| O | C | R | E | S |

La profesoro de latina lingvo estis klariganta la duan deklinacion de la substantivoj. Li havis longan barbon, kiu iam estis tute blanka sed kiu flaviĝis iom post iom. Liaj bluaj okuloj montris bonkorecon.

- *Lupus, lupi*, li diris per sia laŭta kantema voĉo, *discipulus, discipuli*, jen du substantivoj de la dua deklinacio, la lupo kaj la lernanto. Ili finiĝas nominative per *-us*, dum la substantivoj de la unua . . . Rigar! vi dormas, ĉu ne? stariĝu! Kiel finiĝas la substantivoj de la unua deklinacio?

Rigar stariĝis silente kaj ekrigardis la profesoron.

- Vi skribu tion ĉi kvindekfoje por morgaŭ: *nauta, nautae; insula, insulae*, en ĉiuj kazoj!

Rigar residiĝis gratante sian oreilon.

- *Discipulus, discipuli, discipulum* . . . kante klarigis la instruanto. Karlo pripensadis dormeme. Estis tiel varme. Je kio utilas la lernado de la latina lingvo? li pensis. Neniu ĝin parolas nun, lia patro diris. Tamen pri ĝi estis

io mistera, io antikva, kiu plaĉis al Karlo. En la latina lingvo estas ĉiuj malnovaj surskribaĵoj, sur la muroj kaj en la preĝejoj. La sinjorinoj ne komprenas la latinan lingvon, nek multaj aliaj personoj. La preĝoj kaj la meso en la katolikaj preĝejoj estas latine dirataj.

Dum Karlo pripensis, lia najbaro Man pacience laboradis. Per sia poŝtranĉilo li jam engravuris sur la benko sian tutan antaŭnomon kaj nun komencis grandan M. Sed bedaŭrinde lia tranĉileto estis tro delikata kaj subite ĝi brue rompiĝis.

La profesoro malrapide alpaŝis.

- "Man, knabo mia, mi devos vin severe puni. Kion vi skribis? Vian nomon? Malsprita amuzaĵo! Morgaŭ vi ne scios ion pri la dua deklinacio. Tiuj benkoj estas en terura stato, ĉiuj estas gravuritaj; vi ne havas iom da respekto al la licea meblaro." Li ekpromenis tra la klaso.

"Stanen, ankaŭ vi skribis vian nomon kaj ĝin per makuloj ĉirkaŭis! Delasar, vi desegnis tiun ĉi vizaĝon, ĉu ne?"

Sur ĉiuj benkoj estis efektive desegnaĵoj kaj gravuraĵoj diversaj. Estis tre antikva kutimo de la liceanoj engravuri sian nomon por lasi memoraĵon al la posteuloj.

"Mi opinias, ke mi devas vin ĉiujn puni," diris la profesoro, daŭrigante sian promenadon inter la benkoj. "Kvankam tiuj tabuloj estas tre malnovaj, vi estas tamen ĉiuj kulpaj, tre kulpaj. Nur bubetoj kaj malsaĝuloj tiel amuziĝas anstataŭ . . ." Subite li haltis paliĝante antaŭ la benko de Gardiol . . . Dum longa momento li silentis. Lia vizaĝo estis blanka. Liaj okuloj ŝajnis ligitaj al la tabulo de tiu benko. Neniu en la klaso kuraĝis moviĝi aŭ eĉ spiri.

"Knaboj, li ekdiris per mallaŭta kaj tremanta voĉo, tie estas gravurita la subskribo de . . . mia patro."

De tiu tago, Karlo havis grandan amon al la profesoro de latina lingvo.

Intervjuo de Knud Sunier, Vicprezidanto de nia societo



(Fare de Francisko)

- *Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfaze.*

Mi naskiĝis la 8-an de julio 1941 en Ĝenevo, kie mi studis kiel *civil-inĝeniero*. Kiam mi 25jaraĝis mi renkontis Marie-Antoinette kaj du jarojn poste ni geedziĝis. Ni vivis en Friburgo, kie mi profesiiis en la departemento «*pontoj kaj ŝoseoj*». Ni nun loĝas en Montreux.

- *Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

De tre longe mi aŭdis pri esperanto sen vere interesiĝi. Tamen Karlota, kun kiu ni konatiĝis en 2012, tre vigle propagandis al ni pri ĝi kaj konvinkis nin...

- *Kiam vi decidis studi esperanton?*

... ni do tuj decidis studi ĝin por la plezuro de la lingvo.

. Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?

Ĉiuj el niaj amikoj surpriziĝis kaj ĉefe timis, ke ni eniris sekton. Ni jam vivas, laŭ iliaj pensmanieroj, kiel «*marĝenuloj*».

- *Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

Poste niaj geamikoj komprenis nian elekton sed neniu volis studi esperanton.

- *Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

Niaj du UK-oj estis en Lillo (2015/Francio) kaj en Seulo (2017/Koreio) post la trajnvojaĝo tra Siberio. Ni ankaŭ partoprenis du italajn kongresojn en Sicilio (2012) kaj Fraskati (2016) apud Romo. Ni ankaŭ rememoras plezure pri ferioj en la kastelo de Grezijono en Francio.